

La Esperanto-Gironde Informilo



MAJO 2023

N° 171

Malpermesate al hundoj kaj italoj



ESPERANTO-GIRONDE

KUNVENO en Espace Simone Signoret en CENON

la 19an de februaro 2023

de la 10a ĝis la 16a

Ceestas: Ĵanseb kaj Annie Brilleaud, Elvezio Canonica, Karima Choukairi, Janine kaj Yannick Dumoulin, Martine Edelbloude, Claudine Pomirol, Marcelo Redoulez, Bernardo kaj Rose Sarlandie

Senkulpigataj: Gloria Gargallo, Katya Gradzion, Joël Lajus, Lucienne Laroche, Dominiko Martins

Elvezio bonvenigas ĉiujn kaj dankas pro la numero 170 de LEGI.

1/ Novaĵoj diversaj

- Aliĝis Hervé kaj Jean-François; tiu lasta ankaŭ iĝis «Kompano» kaj ricevis la kanzon-libron. Restas al Elvezio du libroj vendotaj.

- Clément revenis en la regionon, serĉas laboron; li kandidatis je la universitato kaj atendas respondon.

- Bernard Vidal telefonis, por sciigi, ke la asocio de Gujan-Mestras, kiu estis malfondita, deziras fordoni la restantan monon al iu madagaskara E-asocio. Problemo estas, ke la banka konto estas jam fermita, kaj la poŝt-banko postulas, ke la mono estu ĝirita al asocio (ne al individuo, kaj la madagaskara asocio ne havas bankokonton, nur la prezidanto havas). Do Bernard demandas, ĉu Espéranto-Gironde bonvolas peri por la transsendo de la mono al la madagaskara asocio. Tiu propono estas aprobata de la ĉeestantoj.



- Mesaĝo de Espéranto-France, kiu deziras ĝisdatigi la informojn pri la E-klubo de Nouvelle Aquitaine. Janine zorgos prie.

- Kalendarretoj: **Martine** mendos kelkajn; ili efikas por allog-informi homojn. **Bernardo** uzas ilin por propagandi.

- Radioelsendo: **Bernardo** estis pasintan merkredon intervjuita ĉe RIG (Radio-Iguanodon). Li kunportis plurajn KD-ojn. *La geamantoj sur la verda benk'* (Jacques Yvart) kaj *La Bambo* (JoMo) estis elsenditaj, sed, pro eraro, *Jes ni solidaru* (La Kompanoj), ne. Bernardo montris la kanzon-libron al la prezentisto. La intervjuo daŭras 30 minutojn. Ĝi estos elsendita lundon je la 11a 15 («Bulle d'art») je 90.7.

Marcelo kaj Bernardo partoprenas en radioelsendo ĉe La clé des ondes (90.10) pri «Le travail en questions». La elsendo daŭras unu horon kaj estas elsendita lunde je la 8a vespere kaj la postan dimanĉon je la 13a 30. Ĝi ankaŭ estas podkaste aŭskultebla aŭ elŝutebla el la retejo de la radio:

<https://www.lacledesondes.fr/article/jai-fait-un-reve-quon-remette-en-cause-la-production-et-la-consommation-effrenees>



Sur tiu foto en la studio: Bernardo parolas, Joël Saintier, Marcelo, Patrick Balbastre, Freddy Babet, Graziella Danguy, Raymond Blet.

- La kongreso de Espéranto-France okazos de la 6a ĝis la 8a de majo en Liono. La kongreso de SAT okazos de la 18a ĝis la 25a de julio en Greziljono.

- **Klodin'** informas pri mesaĝo de **Dominiko**, kiu nun estas en Portugalio (vd. fine de la protokolo). Li informas pri la ekzisto de *Infomaniak*, etika nuboj por konservi dokumentojn. Li proponas starigi diskutliston Framaliste, por ke spertuloj helpu la lernantojn progresi.

2/ Pri la kanzonlibro

Yannick havas freŝajn novaĵojn. Antaŭ tri monatoj, li telefonis al Patricia Escalda ĉe Warner kaj atendis. Ĉar nenio okazis, li denove telefonis al ŝi kaj sendis retmesaĝon pasintan vendredon. Ŝi promesis, ke ŝi okupiĝos pri la afero venontsemajne. Ŝi konfirmis la prezon (250€ sen imposto; imposto: 10%) por 200 ekzempleroj.

Li povos kontakti la rajthavanton de *Heureux qui comme Ulysse*. Martine donos la adreson.

Martine: La eldonkosto estos tre alta kaj Espéranto-Gironde perdos monon.

Marcelo: Kiu stokos la librojn? Kiu okupiĝos pri la sendo? pri la fakturoj? La unua cento iros al la brasensŝatantoj. Pri la 2a cento: se ni vendas nur al tiuj, kiujn ni konas, la stoko longtempe restos. Ni perdos monon se ni sendos dekon da al SAT-Amikaro, Espéranto-France (10 + 3).

Yannick: Ni privilegiu rektan vendon dum kunvenoj, kongresoj...

Klodin': Kiu «ni»? Necesas esti disponeblaj por la intervenoj.

Yannick: Unue al brasensŝatantoj kaj per pribrasensaj facebook-paĝoj.

Oni povas proponi kelkajn al la UK de Torino. Bernardo kaj Elvezio pretas kunporti kelkajn.

Yannick povas informiĝi pri la *Relais-Colis*, por la sendo de la menditaj ekzempleroj. Cetere li pretas stoki la 100 unuajn ekzemplerojn kaj ilin sendi.

Marcelo petos, ke ili estu senditaj al la poŝtoŝefo de Cenon (kaj ne al Palmer).

Yannick: Oni sendu ekzempleron al brasensŝatanto-retejo kaj al la muzeo de Seto. La leĝa depono estos sendenda al la departementa arkivejo kaj al la Nacia Biblioteko.

Marcelo: Restas kvardeko da libroj el la lastaj kvindek.

3/ Aliaj aferoj

- **Bernardo:** Ĝis nun, neniuj novaĵoj pri la arkivejo. La arkivaj dokumentoj daŭre kuŝas ĉe li.

- Denuna adreso de Esperanto-Gironde: Médiathèque Jacques Rivière, 2 avenue du Président Vincent Auriol, 33150 Cenon.

- **Janine** raportas pri telefonalkvoko de Kimie. Ŝi antaŭnelonge festis sian 80an datrevenon. Ŝi iris al Japanio por tiu okazaĵo kaj tie vidis kanzonlibron, kiu, ŝi pensis, povus interesi La Kompanojn. Do ŝi ĝin aĉetis kaj plej baldaŭ sendos al Janine kaj Yannick el Britio por la asocio.

- **Klodin'** informas pri Katya: Ŝi sukcesis, post staĝo en iu apoteko en Bordoŝo, esti dungita laŭ konstanta kontrakto en alia apoteko en Floirac. Ŝi ege ĝojas pri tio, kaj iom malĝojas nur pro tio, ke ŝi ne plu intervenos en SIREC, kies skipon ŝi ŝategis.



Kimie Markarian

Telefonalkvoko de Bernard Vidal: Li tute konfirmas la aferon pri la donaco al la madagaskara E-asocio. (vd lian retmesaĝon fine de la protokolo).

La kunveno finiĝas je la 13a 15.

Posttagmeze Marcelo prezentas al ni bildaron pri tre bela movbilda filmo *Malpermesate al hundoj kaj italoj*.



Eltiraĵoj el la mesaĝo de Bernard Vidal

«[...] Lors de la clôturation de notre association de Gujan, nous avons décidé de faire profiter une autre association de ce qui nous restait sur notre compte bancaire à la banque Postale, nous avons recherché dans le Gvidlibro, le guide des associations de L'UEA (Universala Esperanto-Asocio), les coordonnées d'une association, nous avons choisi une association à Madagascar. J'ai écrit à son responsable (Fidilalao Henriel), qui est intéressé et m'a transmis la photo de son RIB personnel, il n'a pas de compte associatif. Comme j'ai rendu le chéquier à la présidente, je ne pouvais pas faire de virement, la présidente (Herminia) ayant décidé de clôturer le compte et de mettre cet espérantiste bénéficiaire du reliquat (tout frais déduit). Suite à notre courrier de clôture, la Banque postale ne veut pas virer sur son compte car

ce n'est pas un compte associatif ou 1901, ni reverser sur le compte de la présidente. Dès la réception de votre RIB je le retransmettrai à Herminia, pour qu'elle l'envoie à la Banque Postale. Quand vous percevrez ce reliquat (694,52€) vous pourrez ensuite le virer sur le compte de l'espérantiste avec la copie de son RIB que je vous transmettrai bientôt.

Quelques infos sur lui :

Voici son blog <https://linktr.ee/henriel>

C'est un professeur de français dans un lycée, qui habite à Ambohidrapeto, à 5 km à l'ouest d'Antananarivo (Tananarive), et édite chaque mois une gazette en espéranto.»



Eltiraĵoj el la mesaĝo de Dominiko al Marcelo

«[...] Mi ankoraŭ ne pagis mian kotizon ĉar oni ne povas fari tion per debetkardo aŭ ĝiro sed nur per ĉeko aŭ kontante. Oni povas alĝui debetkardon kaj kreditkarton per Hello Asso en nia retejo, tio estas senpaga.

La retejo de la asocio gravas por la novaj anoj. Mi rigardis plurajn fojojn la retejon sed pensis, ke la asocio kovimas ĉar ĝi ne estis ĝisdatigita. Poste, mi kontaktis Elvezio-n per tekstmesaĝo (SMS) (lia telefonnumero estas en la retejo) kaj li diris al mi, kiam la asocio estas malfermita kaj la novan adreson. Mi ankaŭ pensas, ke la tradukoj estas malfacilaj por lernantoj, la nivelo estas tre alta.

[...] Mi kreis liston por lernantoj, kiu ebligas al lernantoj peti klarigojn kaj al spertaj esperantistoj respondi. Mi provas ĝin.

Aktuale ni nur estis du aliĝintaj lernantoj, mi kaj mia amiko Eriko, kiu ankaŭ estas radioamatoro kiel Yannick, kiu konas lin. Fernando kaj Aymeric (juna amiko, kiun mi renkontis per Amikumu) ne aliĝis.

Ĉu vi bonvolos aliĝi al tiu listo?:

<https://framalistes.org/sympa/subscribe/lernantoj>

Tiu listo ebligas al anoj / aliĝintoj legi la respondojn al demandoj de aliaj anoj.

Ekzemple:

1. mi petas, kial estas akuzativo en «La venontaN fojoN, mi...»

Aliaj listanoj (spertuloj kaj lernantoj) ricevos mian demandon.

2. vi aŭ alia spertulo respondas

3. Aliaj anoj (aktuale nur Eriko) povas lerni tion.

Nun mi havas kamioneton, kiu funkcias kaj povas movi aferojn de la kastelo Palmer se necese. Mi havas iomete da spaco en Clérac, proksime de ĉe Yannick kaj Janine.»

Raportis Janine

MALPERMESATE AL HUNDOJ KAJ ITALOJ

Filmo de Alain Ughetto
Francio-Italio 2022 – 70mn
Franclingvaj voĉoj de Ariane Ascaride (Cesira), Gérard Meylan (Luigi) kaj Alain Ughetto (La rakontanta mano)
Scenaro: Alain Ughetto, Alexis Galmot kaj Anne Pascetta

Ekde la antaŭtitola parto, spektantoj estas ĉarmataj de tiu nerezistebla, sentempa, kurioza filmo, ellaborita, brikolita, filmita kaj animita per la mano de Alain Ughetto laŭ metodo *Stop motion* (tekniko, kiu konsistas, planon post plano, en apenaŭ percetebla movo de la personaĵoj por vivigi ilin). Specifa atuto de tiu filmo **Malpermesate al hundoj kaj italoj** estas ĝia metiista aspekto, ĝia emo utiligi brikolitajn etaĵojn, kiuj poezigas la tuton. Dum tiu prologo la reĝisoro malkovrigas la diversajn etapojn de la kreado de la dekoraĵoj kaj knedopastaj personaĵoj, de la domoj el kartono.



La rakonto – Familia historio

La filmo vagas inter la granda Historio, familiaj memoraĵoj kaj viveroj pruntitaj el la fantazio de Alain Ughetto. La voĉoj estas kondukiloj, ritmante la scenojn, ligante la epizodojn de tiu familia sagao. Kvazaŭ fabelece, la avino rakontas al sia nepo, kion ŝi travivis.

Humure la aŭtoro vivigas la knedaĵojn, kiel infano pupojn. Malgraŭ la proksimeco kun la personaĵoj, Alain Ughetto neniam forgesas la fluon de la Historio, kiu gvidas la destinon de tiu familio ĝis Francio, kie ĝi fine enradikiĝis post longa itinero.

Emocioj daŭre flirtas, tamen neniam la filmo malheliĝas en dramon. Duagrada senĉese relativigas la vivspertojn kaj suferojn, kiujn la familio alfrontas: mizero, ekzilo, morto, rasismo... Tiujn realaĵojn kunvivas la spektantoj dum la tuta daŭro de la filmo, kiu montras, ke pri tio eblas ankaŭ ridi.

La plezuro de la transdono kaj la familiaj ligoj esencas kiel motoro.

Komence de la 20a jarcento, norde de Italio, la vilaĝo Ughettera estas lulilo de la familio Ughetto. Ĉar vivo en tiu regiono iĝis tre malfacila, la familio Ughetto revas ĉion rekomenci eksterlande, en Francio, eble eĉ en Ameriko. Laŭ legendo, Luigi Ughetto transiras la Alpojn kaj komencas novan vivon en Francio. Tio ŝanĝis la destinon de lia amata familio. La nepo rakontas ĝin.

La filmon gvidas fikcia dialogo inter Alain, la aŭtoro kaj Cesira, la mortinta avino de la aŭtoro. La aŭtoro pridemandas ŝin pri ĉio, kion li scivolemas. Jen atesto pri la travivaĵoj de pluraj generacioj de italaj elmigrintoj.

Noto de la reĝisoro Alain Ughetto

Okaze de familiaj kunmanĝoj mia patro raportis, ke en Piemonto itala vilaĝo nomiĝis Ughettera, kaj ke ĉiuj tieaj enloĝantoj havis la saman nomon kiel ni. Post lia morto mi tien iris por esplori, ĉu tiu vilaĝo vere ekzistis. Ĝi ja ekzistis: Ughettera, la tero de la familioj Ughetto!

Mia enketo komenciĝis antaŭ naŭ jaroj. Ankaŭ la filmo. En la tombejo, mi trovis nek la tombon de mia avo, Luigi, nek tiun de mia avino Cesira... Kio okazis? La tiuepokaj atestantoj (Italio 1870aj jaroj) malaperis, la tegmentoj de iliaj domoj forfalas sur ilian kamparanan pasintecon. Arboj kreskis super iliaj karboministaj vivoj. Pri ili postrestas nenio plu.



Donaco de tiu filmo estis la malkovro de la libro de Nuto Revelli *Le monde des vaincus* (*La mondo de la venkitoj*). Tiu itala sociologo registris atestojn de gekampanoj samaĝaj kiel miaj geavoj, kiuj vivis samloke en Piemonto. Kortuŝaj atestoj pri malsato, mizero, militoj...

En Ughettera mi kolektis ĉiujn ajn ĉiutagajn objektojn: lignokarbo, brokolo, kaŝtanoj... Per ĉio tio reveninte en mia laborejo, mi preparis dekoraĵon. La brokoloj iĝis la arboj, la lignokarbo, la montaro, la sukerpecoj, brikoj... Meze de mia laborejo, kun Jean-Marc Ogier kaj lia skipo, ni rekonstruis tiun malaperintan medion.



Ni memoras pri niaj gepatroj, iom pri niaj geavoj, sed trans ili? Kvazaŭ nenio pli. Jen mallumo. Jen la granda historio. Interesis min retrorigardi tempokuron, por ligi intiman memoraĵon kun historian elvokaĵon. Hodiaŭ malantaŭ mia nomo, mi malkovris rakonton, kronikon de unu familio inter centoj da aliaj. Por verki tiun rakonton min insipris

realaĵoj. Realaj de la vivo de parto de mia familio origine el Piemonto. Mi funde esploris mian memoron, tiun de miaj gekuzoj, gefratoj. Inter milito kaj migrado, naskiĝoj kaj mortoj, rakonto skiziĝis. Trans la ĉagreno, kiun estigas persona historio, mi malkovris mirindan vojon rakontitan en la filmo.

Luigi, mian avon, mi ŝatus koni, sed mi ne konis lin. Sed mian avinon, Cesira, mi ja konis. Kiam ŝi mortis mi estis dekdu jara. Mi nomis ŝin “Mémé”. En mia imago Mémé tiel naskiĝis, apud la gazforno, nigre vestita, manojn en la polento. Ŝi volis esti pli franca ol francino, tiel ke mi neniam aŭdis ŝin paroli la italan lingvon. Jam frumatene ŝi kantadis en la kuirejo, preparante polenton kun lakto matene, polenton kun kuniklaĵo tagmeze, polenton kun fromaĝo bakita en forno vespere. Kaj mi ekkonsciis, ke antaŭ ol nomiĝi “Mémé”, mia avino estis Cesira, ke ŝi estis juna kaj bela, surhavis kolorajn vestojn, ke iuj ŝin deziris kaj amis.

En la laborrenkontiĝoj *Vivement lundi ! (Rapide lundon!)* en Renno ni konstruis la personaĵojn: Luigi, Cesira, Vincent, mia patro, kaj ĉiujn multnombrajn pupojn akompanontajn. Cesira estas la 23-centimetra figuro videbla en la filmo. Pridemandate, ŝi rakontis al mi sian historion, sian vivon en Italio, sian renkonton kun Luigi, la abortitan vojaĝon al Ameriko, kial Francio?...

Kiam la projekto estis sufiĉe dokumentita, la rakonto adaptita, la rakonto trovita kaj la scenoj selektitaj, restis la tasko min integri en la filmon. La temo, kiu interesis min, estis la transdono de mano al mano. La manoj de mia avo transdonis sian scipovon al la manoj de mia patro. Kaj siavice la manoj de mia patro transdonis sian scipovon, kaj hodiaŭ plu mi memoras; tial mi sentis devon atesti. Mano, mia mano, iĝis personaĵo, aganta sur tiu medio kaj en la laborejo. La mano laboras, pridemandas kaj intervenas.



Grandparte la filmo estis filmita en studio en Beaumont-lès-Valence de januaro 2020 ĝis 31a de julio 2021. Interesis min montri laborantajn homojn, konstruantajn en Francio niajn infrastrukturojn: tuneloj, vojoj, pontoj, baraĵoj. Tiuj homoj, sen kaŝi sin, restis entute nevideblaj. Mi lumigis tiun rakonton, kiu komenciĝas per «Mi» kaj rapide diras «Ni». Ĉu ni estas poloj, hispanoj, portugaloj, baratanoj, vietnamoj aŭ nordafrikanoj, pasinteco estas en nia DNA*.

(NdT: *DNA = DeoksiriboNuklea Acido)

Eĥe al hodiaŭa aktualaĵo mi deziris atesti pri la kielo tiuepoke oni akceptis ekterlandanojn.

Mi prilaboras tiun filmon de naŭ jaroj kaj mi ŝatas ĉiujn bildojn. Ĝi estas unika filmo, por kiu ĉiu alportis sian scion, kompetentecon, memoraĵon. Skipa laboro longa kaj bela, komuna aventuro kunigis produktistojn, animantojn, teknikistojn el ĉiuj anguloj de Eŭropo, por prezenti al publiko tiun belan, belegan donacon.

Atestofilmo, sed antaŭ ĉio, amfilmo!

Elmigri



Pro la severeco de la vivkondiĉoj sur la piemontaj montoj popoloj ĉiam transiris Alpojn por plibonigi sian ĉiutagan vivon. Viroj kaj virinoj raportas, ke ili iris «sin ludoni» kiel sezonulojn. Ankaŭ infanoj, tuj post neĝofandiĝo, kiam eblis piede transiri la montojn.

Ĉiuj memoras pri Barcelonnette, urbeto fama pro sia infan-bazaro, kie pli

malpli 400 geknaboj proponis sin kiel hejmservantojn, ŝafistojn, bovistojn, farmhelpontojn. Roto de nelegiscipovantaj etuloj, obeemaj, malsataj, inter kiuj tre verŝajne Luigi Ughetto, la avo de la reĝisoro. Tie komenciĝis, kiel por multaj ceteraj piemontanoj, lia vivo de nomada laboristo. La elmigrado komence estis regula kaj sezona, kaj rapide definitiva, kiam miloj da kamparanoj forlasis Piemonton celante Francion, Svision aŭ Amerikon.

La piemonta historio raportas pri grundo forlasista de siaj enloĝantoj. Tiu fenomeno iĝis masiva ekde la dua duono de la 19a jarcento. Inter 1876 kaj 1985 pli ol 27,5 milionoj da italoj forlasis sian landon. Jen 650-homa vilaĝo, kiu ĉiutage senhomiĝas, aŭ urbo kiel Mulhuzo kun ĉirkaŭurbo, kiu malpleniĝas ĉiujare! Kaj en tiu masiva elmigrado piemontaj elmigrantoj plej abundas.

La vojon de tiuj elmigrantoj la filmo montras, paŝante kun Luigi, Cesira kaj iliaj kompanoj, kamparanoj el Piemonto, laboristoj en Francio. Ilia destino prezentas historion de manlaboristoj, elmigrantoj, nomadoj, hieraŭ italaj, hodiaŭ afrikaj, kiuj vendas siajn fortojn kaj kontribuas al la agrikultura kaj industria disvolviĝo en multnombraj francaj regionoj, laborante laŭ kondiĉoj apenaŭ pli dezirindaj ol tiuj, kiujn ili forlasis en sia naskiĝloko.

Kial tiu titolo?

Komence aperis kaj ekfluis sur la reto malnova bildo pri ŝildo nigreblanka, alkrōcita ĉe pordo de malnova kafejo. Ĝi jukis min. Mi pensis, ke tiu bildo venis el Savojo, aŭ de Aino, aŭ eble Svisio. Sed fakte ĝi unue aperis en Belgio. Sekvis pluraj landoj sed ĝi ne estis en mia rakonto. La perforto, la krueleco kaj feroceco de tiu ŝildo je akcepto de migrantoj perfekte adaptiĝas al la historia elvokaĵo, kiu fundas tiun filmon. Tial tuta sceno raportas pri tiu ŝildo, kiu iĝis la titolo.

Vidpunkto de la antropologo Philippe Hanus

Malpermesate al hundoj kaj italoj estas memor-verko fikciema, rakontanta la migradojn, dum preskaŭ unu jarcento, de piemonta familio. Tiu de la aŭtoro, Alain Ughetto. Trans la Alpoj, kiel parto de la historio de la homaj movadoj.

Luigi, la avo de la reĝisoro, estas viro kun romaneca destino. Li piediris plurfoje trans la Alpan barilon (foje je altaj altitudoj spite al mil danĝeroj), trans plurajn landlimojn, alfrontis du militojn, mizeron kaj faŝismon. Survoje li ekamis Cesiran, kaj kun ŝi fondis familion. Inter Italio, Svisio kaj Francio. La posteuloj de tiu nomada laboristo fine instaligis borde de Rodano kaj samkiel aliaj francidoj pasiigis pri Tour de France, laŭ muziko de la akordiono de Yvette Horner. La aventuro de Luigi ja spegulas la migradan sperton de pli mapli 25 milionoj da italoj forlasintaj la duoninsulon en la daŭro de unu jarcento, cele pluvivi en Eŭropo (kaj aparte en Francio), en Ameriko aŭ en Aŭstralio. Dise tra la mondo ili kunportis la kulturon de sia lando, siajn revojn kaj esperojn, sian deziregon sukcesi sur nova grundo.

Rilatante ĉiujn etapojn de Luigi, Cesira kaj iliaj posteuloj, la filmo proponas enkar-nigitan rigardon al la itala enmigrado. Skale de la Alpa kaj Rodana medio ĝi pridemandas la artikon inter la teritoriaj kaj naciaj logikoj.

La titolo de la filmo *Malpermesate al hundoj kaj italoj* spronas la spektantojn. Ĝi metafore aludas al italfobio, laŭlitere «timo antaŭ italoj» - ĉeestanta en la franca socio dum la jaroj 1875-1914, en kunteksto kun pligravigo de la naciismoj en Eŭropo, ripetaj diplomataj tensioj inter Francio kaj Italio, kaj krizo de la labormerkato. Itala enmigrinto iĝis propeka kapro. Italfobio montriĝis ankaŭ dum la faŝista periodo, kaj dum la dua mondmilito. Ekde 1945 iom post iom pliboniĝas la perceptado de la transalpanoj en la franca socio. Tamen ĝi restas negativa en Belgio, Germanio kaj Svisio ĝis la 1970aj jaroj!

Nuntempe italeco estas laŭmoda en la Sud-Orientaj urboj de Francio. De Ĉamberio al Nico, pasante tra Grenoblo, kiu pretendas je «itala aspekto».

Artikante intiman memoron kun kolektiva memoro pri migradoj, la filmo transformas ekzil-rakontojn por ebligi al ili doni sencon trans la nuraj rondoj de la italaj elmigrintoj kaj ties posteuloj. Tiu emancipiga verko kun universala trafpovo esprimas la ideon, laŭ kiu homoj en migra situacio, hieraŭ kiel hodiaŭ, partoprenas en neelĉerpebla movado tra spaco, kunesenca por homaro antaŭeniĝanta por pli bone vivi aŭ simple vivi.





La ŝildo sur la pordo de kafejo

« Malpermesate al hundoj kaj italoj »



- Tiu sceno ilustras la tragikan situacion de ekzilintoj.
- Alveninte en Francio por labori aŭ/kaj fuĝi faŝismon, italoj, samkiel multaj aliaj eksterlandanoj, suferas rasismen kaj ksenofobion.
- Tiu ŝildo humiligas italojn ĝis nivelo de bestoj.

La ŝildo sur la pordo de kafejo

« Malpermesate al hundoj kaj italoj »



- Tiu sceno montras diskriminaciojn, kiujn suferas enmigrintoj en socia spaco normale malferma al ĉiuj.
- Kiam la infanoj demandas, kial la posedantoj tion skribis, Luigi mensoge tromprespondas por malpliigi tiun perforton ĉe la pli junaj kaj humure protekti ilin.
- Tiu ŝildo kompreneble hodiaŭ eĥas al la aktuala situacio de la migrantoj kaj ilia (ne)akceptado en Eŭropo.

Foto el la filmo La vita è bella:

« Eniro malpermesata al judoj kaj hundoj »

Bedaŭrinde plu aktuala

20an de septembro 2021

- El la gazeto *Le Matin*
- Afiŝetoj pululis en Ĝenevo



- hontinda kampanjo trafis multajn komercejojn en Ĝenevo per sloganoj memorigantaj malhelan periodon de la svisa historio: en la 1970aj jaroj ksenofobio kontraŭ italaj enmigrintoj severis tie.
- <https://www.lematin.ch/story/des-affiches-interdit-aux-chiens-aux-non-vaccines-pullulent-a-geneve-359008228230>

La fabrique du film

ellaborado kaj fabrikado de la filmo

- <https://www.kubweb.media/page/interdit-aux-chiens-italiens-animation-alain-ughetto/>
- <https://filmsenbretagne.org/interdit-aux-chiens-et-aux-italiens-sur-les-traces-des-batisseurs-italiens-un-chantier-de-memoire/>

La tutan dosieron ellaboris Marcelo

KRONIKO DE ORDINARA RASISMO EN SVISLANDO: la fifama dancejo, kiu malpermesis la eniron al la italoj en 1977



Komence de 1977, en la enirejo de svisa dancejo en Bienne (dulingva urbo – franca kaj germana – en la kantono de Berno), oni gluis afiŝon kun la jena anonco: “Malpermesata eniro al la italoj en tiun lokalon”. La afero provokis grandan protestan movadon.

Foje, ŝajnas ke la tempo fluas tiel rapide kiel geologia erao. Tamen, nur malpli ol 50 jaroj pasis. Malpli ol du generacioj. Hodiaŭ, italojn, kiuj alvenas al Svislando, oni akceptas preskaŭ kiel najbarojn. La fikromnomoj, per kiuj ili estis nomataj – longan liston ni povus fari – feliĉe kuŝas nun en la profundo de la historio. Tamen, kelkfoje indas kribri tiujn ejojn.

Estas la unua de januaro 1977. Sur la pordo de dancejo en Bienne oni gluis afiŝon: “Malpermesata enirejo al la italoj”. La novaĵo rapide disvastiĝas kaj la polemiko iĝas pli kaj pli forta. Kelkajn tagojn poste, aperas en loka ĵurnalo la unua letero de leganto: “Ĉu la malpermeso al la italoj iĝos baldaŭ ĉiutaga rutino, same kiel la afiŝoj “Judoj nedezirataj” aŭ “Nigruloj for”?”.

La sesan de januaro, vespere, centoj da italoj kaj anoj de la Aŭtonoma Junulara Centro de Bienne protestas antaŭ la dancejo Alba. La du posedantoj – la fratoj Toni kaj Joseph Favrod – fermas la enirpordon. La situacio rapide malbonas. La manifestantoj rompas la pordojn kaj la fenestrojn kaj postulas, ke la afiŝo estu malgluita.

La sekvan tagon, kvankam la fifama afiŝo estis forpelita, la sama sceno ripe-tadas: ĉi-foje, tamen, pli pace. La gejunuloj de la Aŭtonoma Centro organizas piknikon ene de la dancejo.

Dum la postaj tagoj, la fratoj Favrod provas pravigi sian agon. Ili diras, ke la afiŝo tute ne estis rasista, kaj ili nur volis eviti, ke “amaso da fiuloj eniru ilian dancejon ĉefe por ĝeni la virinojn, ĉar ili jam provokis pli ol 300 frankojn da fuŝaĵoj: kuleroj kaj tasoj rompitaĵ, seĝoj kaj eĉ tabloj ŝtelitaj”.

Unu el la tagĵurnaloj de Bienne pravigas tiujn argumentojn: “Temas ĉefe pri junaj senlaboruloj, kiuj anstataŭ reveni al sia lando preferas profiti je la senlabor-subvencio kaj ĝeni honestajn homojn; ili estas fakuloj pri la kverelejoj kaj interbatiĝoj”, tiel skribas la ĵurnalisto.

Pluraj leteroj de la legantaro samopinias. Kvankam ekde pluraj jaroj ankaŭ hispanoj kaj portugaloj loĝas en Svislando, la itala komunumo estas la plej multnombra kaj koncentras la tutan malammon de iu sektoro de la svisa popolo. “Ne estas tute hazarde, ke la afiŝo mencias nur la italojn”, asertas la svisa historiisto Florian Eitel.

Tamen la provo, per kiu oni senkulpiĝas pri rasismo, ne estas konvinka. Krom la bedaŭrinde klasikaj stereotipoj pri la italoj, kiujn la fratoj montras, faktoj aperas, per kiuj oni evidentigis, ke la fratoj Favrod enverŝis oleon sur la fajron.

Fakte, ili intencis “purigi” sian dancejon el la “Sautschinngen”, fikromnomo kunmetita de la germana “Sau”, t.e. “porko”, kaj de la neologismo “tschingg”, devenanta de la itala “cinque” (kvin), per kiu la italoj estis konataj, pro ilia emo al la fama itala ludo “morao”, ludata per manoj kaj fingroj.

La afero de la Alba-dancejo okazas en grava momento, kiam la svisa popolo devas sin esprimi, ankoraŭfoje, por decidi, ĉu oni devas malkaltigi la kvanton da esterlandanoj. Temas pri la kvara iniciato kontraŭ la tiel nomata “eksterlandaniĝo”, promociita de la ekstremdekstrula Respublika Movado de James Schwarzenbach. La baloto okazas la 13-an de marto de tiu jaro, 1977. Jen la oficiala teksto de la iniciato: “la Konfederacio zorgas, ke la kvanto da eksterlandanoj ne superu 12 %-on”.



Laboristoj el Italio alvenante en Svisio en la jaroj 1970-aj

La fratoj Favrod – kaze ke oni devus ankoraŭ konfirmi ilian politikajn ideojn – reklamas favore al la iniciato.

Male al la dua iniciato de Schwarzenbach, kiu estis rifuzita de 45 % el la popolo, ĉi-foje la malkonsento estas ankoraŭ pli forta: la projekto estas kontraŭita de 70.5 % el la balotintoj, eĉ se en la industria urbo Bienne, kiu suferis pro la petrola krizo, la nea proporcio estis malpli alta (58 %).

Ĉu la epizodo de la Alba dancejo estis nur la lasta loka ekzemplo de tiuspeca kontraŭitala ksenofobio, kiu estis kutima en la lando kelkajn jarojn antaŭe? La historiisto Florian Eitel dubas pri tio: “Ne, mi pensas ke tiu sento estis ankoraŭ tre forta ĉe granda parto de la popolo. Mi ne kredas, ke oni povas paroli pri pli granda akcepto de la itala komunumo”.

Se la jesa proporcio okaze de la kvara iniciato estis malalta, la kialo troviĝas en aliaj faktoj, ĉefe en la granda malaltigo de la eksterlandaj laboruloj pro la ekonomia krizo de la mezaj sepdekaj jaroj. Krom tio, la federalaj aŭtoritatoj jam faris aranĝojn por limigi la enmigradon. La timo pri la “eksterlandiĝo” estis malpli forta ol ĝi estis kelkajn jarojn antaŭe; tamen, ne pro tio la antiitala ksenofobio malaltiĝis.

Ankaŭ veras – asertas la historiisto – ke la ŝanĝoj estis proksimaj. Ekde la fino de la sepdekaj jaroj, oni povas rimarki, kaj en la socio kaj en la aŭtoritatoj, mensoŝanĝon. Oni konscias pli kaj pli, ke paroli pri “portempa enmigrado” ne plu taŭgas, kaj ke la homoj alvenintaj al Svislando ja restos tie. Necesas, pro tio, favori la integradon, ĉefe de la infanoj en la publikaj lernejoj.

Pro tio la itala komunumo, dum la okdekaj jaroj, iĝas la simbolo de tiu sukcesa integrado. Tamen, la ksenofobio de parto de la svisa popolo ne malaperas kvazaŭ magie: ŝanĝiĝas nur la nacieco de la propeka kapro. Dum la sama jardeko, fakte, la refuĝintoj el eksa Jugoslavio iĝas la novaj ostracigitaj homoj. La historio povas ripetiĝi.

Tradukis Elvezio el la itala:

https://www.tvsvizzera.it/tvs/quella-discoteca-di-bienne-che-viet%C3%B2-l-ingresso-agli-italiani/48359784?utm_campaign=manual_tvs&utm_medium=email&utm_source=newsletter&utm_content=o&utm_term>manual



En la jaroj 1950-aj

«LA LUPOJ ŜANĜAS LA RIVEROJN»

Kion pensi pri tiu aserto? Ĉu kredeble? Ĉu temas pri sofismo?

Komence sofismo ekis en antikva Grekio ĉirkaŭ la 4a jarcento antaŭ K. Etimologie la vorto venas de la greka «*sophia*», *saĝo*, kaj tiel oni nomis la paroladon de la sofistoj, helenaj salajrataj profesoroj pri retoriko, ankaŭ oratoroj, kiuj fieris esti kapablaj persvadi per verŝajnaj rezonadoj, aŭskultantaron de politikaj aŭ tribunalaj asembleoj.

En Ateno, la filozofoj Sokrato kaj Platono polemikis kontraŭ ili kaj denunciis ties argumentarojn, kiujn ili taksis kiel trompajn rezonadojn konstruitajn sur mistraktata logiko.

Nun oni difinas sofismon kiel rezonadon ŝajne ĝustan sed fakte erarigan. Sed ankaŭ troviĝas la vorto «paralogismo», kvazaŭ sinonimo de sofismo kun la precizigo *sen trompa intenco*.

Sofismo argumentas per retorika procedo celante konvinki la aŭskultantaron kaj konsentigi ĝin pri fluo da opinioj aŭ tezo. La argumentoj de sofismoj baziĝas sur deduktoj.

Jen unu ekzemplo inter aliaj:

A implikas B; B implikas C; C implikas D ktp ĝis la konkludo K. Do A implikas K.

Oni uzas specifajn observojn, ne absolute malverajn, sendepende apudmetitajn unu apud la alia, cele atingi rezulton pli ĝeneralan. Tial la konkludo povas esti falsa kvankam asertata kiel vero.

Koncerne la ekzemplon de la Yellowstone-parko:

A- reinstalado de la lupoj en la nacia natura parko Yellowstone

B- malapero de cervoj el kelkaj valaj zonoj

C- reapero de vegetaĵoj kaj arboj en tiuj valoj

D- plimultiĝo de la insektoj kaj etaj mamuloj (musoj, kunikloj...)

E- plimultiĝo de la birdoj kiuj nestas sur la novaj arboj

F- plimultiĝo de la rabobirdoj

G- plimultiĝo de la kastoroj, kiuj ŝatas manĝi arbojn

H- plimultiĝo de beroj, frandaĵo por la ursoj

I- plifirmiĝo de la riverbordoj

J- stabiliĝo de la fluoj.

Mankas la klimatovarioj (ekz. Periodo de sekeco, kiu finiĝis).

K- konkludo: lupoj ŝanĝas la riverojn.

La fina aserto estas kontestebla ĉar bazita sur ununura kialo. La teorio estas tro simpla kaj naturo estas malsimpla. Reale la konkludo estas la rezulto de pluraj fenomenoj sinkronigitaj en kompleksa korelativo, interligitaj aŭ ne.

Oni povas pensi, ke la intenco de sciencistoj estis entuziasme partigi rezulton de siaj observoj pri spektinda ŝanĝo de la medio post reinstalado de la lupoj. Resume, miriga titolo de artikolo frontpaĝe rapide disvastigas ideon kaj impresas tiujn, kiuj pretas kredi belajn rakontojn.

Io tro simpligita, ĉu tio kredebla?

«La lupoj ŝanĝas la riverojn»... Hm! Laŭ mi, tio estas sofismo. Kaj laŭ vi?

Klodin'



UNUIGITAJ POR LA VIVO

Ambaŭ vivas en dezerto, norde de Brazilo.

Ĉiutage la kakto naskas etajn rondajn fruktojn, plenajn je akvo kaj sukero.

La brazila biologisto Vasconcelos Neto kaj ties kolegoj certigas, ke en tiu regiono, kie la temperaturo atingas 50° C, la lacerto riskas morti sen tiuj akvo kaj sukero.

Sammaniere la kakto malaperus sen la ĉeesto de la lacerto. Post sia manĝo la lacerto fekas en la dezerto tie kaj ĉi-tie, demetante la kakto-grajnojn, kiujn ĝi ne povas digesti.

La biologistoj provis ĝermigi la grajnojn ekstraktitajn el la kakto. Vane! Sen la pasado tra la digesta aparato de la lacerto, la grajnoj restas sterilaj.

Tradukis Monique el Sciences et Avenir (Sciencoj kaj Estonteco)



NIAJ KURSOJ

- En **CENON** (Mediateko Jacques Rivière), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon. (05 56 21 38 64)

- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun mardon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

FASCINAJ LUPOJ 2/3



Bildo el la ret-artikolo [Des rivières et des loups](#), kiu riĉe kompletigas la aserton de Georgo Monbiot, aperinta en antaŭa numero de LEGI.

La lupoj de la parko Yellowstone: jen (tro) bela natura historio!

La postaj paragrafoj fontas el retejo [Zoom-nature.fr](#). Ne temas pri rekta traduko sed resumo de vidpunkto de **Gerardo Guillot**, la retej-verkanto.

La bela kaj spektinda kvinminuta filmo [How wolves have changed rivers](#) tradukita en la antaŭa numero de LEGI, baziĝas sur esploroj de du usonaj sciencistoj, **W. Ripple** kaj **R. Beschta** kaj kunlaborintoj, kiuj publikigis ekde 2001 pli ol 25 sciencajn artikolojn pri la reinstalado de lupoj en la usona nacia parko Yellowstone kaj ĝiaj konsekvencoj. Ili argumentas la teoriojn de nutrokaskado kaj de tim-ekologio, naskitaj pro la lupoj ĉe la grandaj herbovoruloj, precipe alkoj (*wapiti: cervus canadensis*). Laŭ ili, la lupoj malrekte transformis la pejzaĝon de la parko kaj precipe la fluon de la riveroj. Nur tio! Tamen ne ĉiuj lokaj sciencistoj aprobas tiun teorion. Male. Multaj minimume tre forte nuancas tiun modelon kaj tion sciigas jam de post apero de la unua artikolo. Sed la amaskomunikiloj prisilentas la pridubojn kaj kontraŭajn vidpunktojn. Sekve ceteraj sciencistoj eĥas tiun historion kiel entute pruvitan. Do ĉar niatempe dominas infoksoj*, jen ekzemplo eĥita tra la sciencista medio mem, aŭ kiel dogmo instaliĝas kaj iĝas vero!

Pri arboj kaj lupoj

El freŝdata eksperimento, kiu testis la nutrokaskadon, rezultis ke la efiko de la herbovorado de la alkoj ĉe la tremoloj (specio de poploj) ne malpliĝas en lokoj, kie la risiko de la predo estas maksimuma pro samloka ĉeesto de lupoj. Tio kontraŭdiras la asertojn de W. Ripple kaj R. Beschta.

Kaj tiel pluraj sciencaj esploroj, ekzemple en 2010 kaj 2013, montras la ĉefan tiklan punkton de la prastudoj: enkalkuli nur la revenon de la lupoj kiel ununuran eblan punkton. Sed la nutrokaskado estas ne la sola kialo de la ŝanĝoj en la parko. Multaj aliaj faktoroj variis dum la sama periodo: ekzemple la klimato aŭ la topografio de la pejzaĝo.

La aliaj kaŭzoj

Sintezo de diversaj studoj publikigita en 2014 ĝuste pritraktas ceterajn eblajn kaŭzojn, por klarigi la malnombriĝon de alkoj. La predado de ursoj samepoke pliakriĝis kontraŭ alkidoj pro la maloftiĝo de du nutraĵoj por urso gravaj: la trutoj (pro invadema specio) kaj la grajnoj de la pinoj kun blanka ŝelo (pro malsano kaj klimatoŝanĝo). Samtempe ankaŭ la pumaĵoj plinombriĝis. Krome ĉirkaŭ la parko la ĉasado permesis pli fortan pafadon kontraŭ la alkoj: de 6 % al 9 % kaj eĉ ĝis 17 % de la bestaro antaŭ drasta malpliigo pro la forta malplinombriĝo de la alkoj. Krome la regiono tiam suferis longan sekecon. Tial malfacilas aserti, ke la lupoj solaj respondecas pri la malkreskanta nombro de la alkoj. Konklude ĉi-studo pruvas, ke neniel eblas rilatigi la elementojn ĉeesto de lupoj kaj malapero de alkoj. Fakte tre malfacilas pruvi, ke la tim-ekologio funkcias ĉe tiel grandaj bestoj.

Severa estas la verdikto de la aŭtoroj de la sintezo: «Nutrokaskado estas intelekta konstruado en imaga mondo de nutraj ĉenoj simplaj kaj estrataj de ekvilibra dinamiko. Male, plejparto de la ekosistemoj estas nekontrolitaj kaj implikas multajn nutrosistemojn malsimplajn estratajn de malekvilibra dinamiko.»

Scienca rigoreco celas montri, ne ke la argumentado de W. Ripple kaj R. Beschta estas entute falsa, sed ke ĝia hipotezo bezonas esti serioze testita, ĉar ĝi estas probable ne tiel rekta kaj linia. La teorio de la nutrokaskado lupoj/alkoj/riverbordaj vegetaĵoj/riveroj ne povas esti konsiderata kiel pruvita. Ja, la realeco estas sendube multe pli komplika kaj ĉefe multkiala kun forta grado da implikeco inter la diversaj faktoroj.

laŭ Gerardo Guillot - Resume tradukis Marcelo

----- (daŭrigota) -----

**Infokso: nePiva nova vorto formita el informo kaj toksa signifanta: tokse malprava informo*



ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Médiathèque Jacques Rivière
2 avenue du Président Vincent Auriol
33150 CENON

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne

UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Martine EDELBOUDE**

2 rue Raymond Lavigne

33100 BORDEAUX

Tel: 06 73 34 81 88 / mabel1533@laposte.net

* * * * *

Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr

